

Notre modeste bulletin ne peut rendre compte dans le détail des différentes informations. Nous mettons à l'essai la possibilité de recevoir le texte complet de certaines infos. Il peut s'agir d'une feuille (\*), de deux feuilles (\*\*) ou de trois (\*\*\*)... Il vous suffira de nous envoyer un timbre pour les frais d'envoi. Par exemple, en comptant 6 grammes par feuille, un timbre de 0,46<sup>E</sup> jusqu'à trois feuilles, 0,69<sup>E</sup> jusqu'à 7 feuilles, 1,02<sup>E</sup> jusqu'à 15. Merci !




# europe

"Courrier International"

N° 599 - du 25 avril au 1<sup>er</sup> mai 2002

## 7 JOURS DANS LA VIE DES QUINZE

### L'élargissement et le casse-tête des langues



▲ Dessin de Leonard Beard

paru dans El Periódico de Catalunya, Barcelone.

Seules Chypre et Malte font les choses comme il faut : elles parlent grec et anglais. C'est bien aimable à elles, car ces deux langues existent déjà dans l'UE. En revanche, pour les autres pays, et ils sont nombreux, la parole est d'argent et la traduction sera d'or.

Lorsque huit à dix nouveaux idiomes viendront d'un coup s'ajouter aux onze langues officielles actuelles de l'UE, il y aura près de 400 différentes combinaisons de traduction, du travail pour quelques centaines d'interprètes supplémentaires... et jusqu'à 1 milliard d'euros de surcoûts. Plus question, ont déclaré les intendants du Parlement européen, qui tiennent serrés les cordons de la bourse. Ils proposent par conséquent que l'anglais serve de "langue relais" : on traduira d'abord en anglais à partir de toutes les langues de l'Union, puis de l'anglais vers toutes ces langues, ce qui permettra de maîtriser les coûts.

Cependant, les défenseurs de chacune des langues nationales ont du mal à accepter que l'anglais devienne la langue pivot au sein de l'UE. C'est notamment le cas du vice-président du Parlement européen, l'Allemand Ingo Friedrich (CSU). Ce serait la fin de la diversité en Europe, estime-t-il. De ce fait, l'allemand et le français devraient logiquement être, eux aussi, des "langues relais". Mais cela coûterait environ 260 millions d'euros de plus. Une belle bagarre s'annonce donc à Bruxelles : n'auront droit à la parole que ceux qui auront payé d'avance. Seuls les Britanniques se murent dans le silence, car leur idiome est le mieux placé pour l'emporter. Et pourtant ! Ils ne participent même pas à l'euro. Chère Europe, comme tu es injuste !

Nikolaus Blome, Die Welt, Berlin

En complément de l'article de "Courrier International", un autre paru le 2/7 dans "Le Monde" sous le titre : "Une Europe à 21 langues, nouveau boulet budgétaire pour la Commission" et la précision "La polémique sur le multilinguisme continue". Le texte intégral est disponible\*. Le coût du passage à 21 langues est estimé à 521 M d'euros (le double de l'estimation de "Courrier international"). Selon une étude de 2 universitaires, l'anglais serait utilisé par 208 M d'europeens, affirmant le pratiquer en 1<sup>o</sup>, 2<sup>o</sup> ou 3<sup>o</sup> langue (NDLR : chiffres à prendre avec des pincettes), le français par 127 M, l'allemand 118, l'italien 65, l'espagnol 56. Selon eux, si l'anglais était la langue unique, 45% des membres de l'UE seraient exclus linguistiquement (20% en Suède mais 58% en France et 65% au Portugal). La solution anglais + français réduirait le pourcentage à 30%; la solution anglais + français + allemand à 18% (mais 31% en Espagne et 28% en Italie). Quel casse-tête alors qu'il existe une solution bien simple que nous, Espérantistes, connaissons !

\*\*\*\*\*

D'autres chiffres sur les langues dans le monde sont parus dans le tout nouveau "Grand Atlas d'aujourd'hui" (Edition Philip-Hachette). En millions de locuteurs (donc en première langue) le classement donne (entre parenthèses le pourcentage dans le monde) :

chinois 1140 (22) anglais 350 (6,8) espagnol 325 (6,3), hindi 275 (5,3), arabe 215 (4,1), bengali 190 (3,7), russe 180 (3,5), portugais 170 (3,3), français 160 (3,1), japonais 125 (2,4), panjabi 105 (2), allemand 100 (1,9), javanais 75 (1,4), télugu 70 (1,4), coréen 67 (1,3), marathe 65 (1,3), vietnamien 65 (1,3), turc 65 (1,3), tamoul 64 (1,2), italien 60 (1,2).

Ces chiffres seront à comparer avec ceux du "Quid 2003" en cours de parution.

\*\*\*\*\*

#### Infos de dernière minute :

Journée Zamenhof à Toulouse le 14/12  
Congrès de France-Espéranto : à Grésillon, week-end de l'Ascension, donc fin mai.

**Kunveno kaj turismo** : Samideanino (ni prisilentos ŝian nomon) venis al la kunveno de Béziers kaj frumatene enrajniĝis en Montpellier, en la direkto de okcidento. Ŝi baldaŭ eksciis, ke la trajno haltos nek en Agde, nek en Béziers, nek en Narbonne... sed ruliĝos rekte... ĝis Tuluzo ! Estis tro danĝere elsalti la trajnon, tro koste tiri la alarmon... Nia amikino rezigniĝis ŝanĝi la tiklan situacion, eltrajniĝis en Tuluzo, trovis la tempon gustumi lokan specialaĵon en Tuluzo por rehavi fortojn, kaj alvenis ĝustatempe en Béziers por la posttagmeza kunveno, kie ĉiuj ĝojplene salutis ŝin. Partopreno en federaciaj kunvenoj estas riskoplena aventuro !

## **FEDERACIA KUNVENO EN BÉZIERS (la 28an de septembro)**

*(Aldonaj rimarkoj en kursivoj)*

Partoprenis dudeko da federacianoj, senkulpiĝis pluraj (inter kiuj la sekretario pro translokiĝo / nova adreso sur la frontpaĝo), hezitis kelkaj pro necerteco pri la dato/loko, kvankam estis klare en la lasta SFS . La prezidanto bonvenigis ĉiujn, esperante ilian plenan energion post ripozigaj ferioj kaj petis ĉiun sin esprimi koncize pro limigo de la tempo (rendevuo posttagmeze kun Ges. Lafosse por preparoli la Sat-Amikaran kongreson en Cap d'Agde je Pasko) . Ni havis penson por niaj gesamideanoj en departemento Gard, kiuj suferis teruran inundon . Pluraj partoprenintoj en la someraj renkontoj raportis pri siaj spertoj (kaj promesis raporti pli detale por SFS) . Pri la forumoj de asocioj estis fiasko en Montpellier (pluvego), en Béziers pluraj lasis siajn adresojn .

*En la raporto pri la federacia kongreso en Sommières mankis la informo, ke estis disdonitaj al pluraj grupoj cento da informbroŝuroj pri E°, speciale por la forumoj de asocioj aŭ ekspozicioj .*

Kursoj rekomenciĝos baldaŭ en Béziers, Montpellier (tie oni devas akordiĝi pri la gvidantoj), Perpignan, Prades . Estis menciataj pluraj staĝoj, kongresoj fine de oktobro . Pri la staĝo de Vias, restas necerteco koncerne la lokon . Pri ret-kurso, neniu volontulo en la federacio; tamen en SFS ni indikos retadreson .

Leteroj estas sendataj al la diversaj deputitoj de la regiono kun dokumentaro . Anoncoj en la gazetoj : neniu sendis informojn kun adresoj, tarifoj, ktp . Por komenci ni aperigos anoncetojn en "Midi Libre" + "L'Indépendant" tra la tuta regiono . *Intertempe jam aperis la unuaj anoncetoj, vidu la unuan paĝon de SFS .*

Estas anoncata en januaro la vizito de Mikaelo Bronŝtejn, Ruso el St Peterburgo, skribisto, poeto, komponisto, kantisto... Li vizitos nur dek aŭ dekdu urbojn en Francio . Béziers kandidatas por lin akcepti (necesas retadreso) . Sekve de la decido de la Eŭropa Komisiono en Bruselo devigi la etikadon de la nutrovaroj en Francio en la angla, protestkampanjo estas lanĉita . Esperantisto de Chambéry (C. Garino) proponas starigi liston poresperantan okaze de la Eŭropa baloto en 2004; iom dubinda kaj danĝera propono .

Mado Vidal deziras inviti polan paron (geaktoroj) turnei tra Francio . Transdoni la proponon al UFE (prelegvojaĝoj) . *Tamen, koncerne rondvojaĝojn, ĝenerale temas ankaŭ pri prezento al ne-esperantista publiko.* Eldono de poŝtmarko pri E° . La afero estis menciita okaze de komitatkunveno de UFE . Rilati kun Vincent Charlot, tamen necesas atendi taŭgan momenton por rilati kun la Poŝto, despli ke komuna kongreso de la E°-asocioj de Francio kaj de la najbaraj landoj estas nun certa por Pasko 2005 en Boulogne-sur-Mer (centa datreveno de la unua kongreso de E°) . Ĉiuj ĝojas pri tiu decido, atendita de longe .

Akcepto de junaj esperantistoj, helpo al eksterlandaj vizitantaj gesamideanoj : Jean Hénin memorigas pri "Pasporta Servo" . Nova listo estas en preparo, sin anonci baldaŭ (temas pri senpaga gastigado) . Alia sistemo estas "Amikeca Reto", kie oni nur proponas vizitigi la ĉirkaŭaĵon, helpi por trovi hotelon, ktp . Vendiĝas ekzempleroj de la aktuala listo .

JH prezentas du librojn, unue "Vojaĝo en Esperanto-lando" de Boris Kolker . Ĝi taŭgas por diversaj uzoj : por komencantoj, staĝoj, kursoj, progresantoj, kiuj povas legi po unu paĝon ĉiutage <sup>divers-</sup> kaj agrabla aspekto . "Vere aŭ fantazie" de Claude Piron konsistas el diversaj anekdotoj kaj baziĝas sur vortprovizo de 405 bazaj vortoj/subvortoj, kiujn oni povas tuj rekoni .

Kursoj de E° : ĉiu grupo decida pri la financaj kondiĉoj . Ĉu alta kotizo por la kursoj estas dezirinda ?

Kreado de kategorio de "Amikoj de E°" (M. Vidal/J.Gauthier), kiuj subtenos finance : relegi la antaŭlastan paĝon de la lasta SFS pri nova kampanjo de UFE .

**Federacia kongreso** : pro la Sat-Amikara kongreso je Pasko, la lernejoj paskaj ferioj (ĝis la 5a de majo), la staĝo de Vias meze de majo, la semajnfinaĵoj "pontoj" de la 8a de majo kaj de Ĉielirado, la nura elektebla dato estas la **24a de majo** ! Proponoj de Montpellier kaj Perpignan : la dua estas iom malproksima, ambaŭ havas la okazon tutjare konatigi E-on . Preferinde kongresi en loko, kie E° ne estas konata . Ne mankas urb(et)oj inter Ganges kaj Lodève-Clermont l'Hérault, kie ni povus kongresi kaj eventuale organizi ekspozicion . Ni konsultos pri luado de salonoj, ktp . Eventuale komuna dimanĉo apude, anstataŭ la amika semajnfino . Afero sekvota, proponoj bonvenaj . Dum la tagmanĝo, ni konatiĝis kun Josée kaj Michel Lafosse, aktivaj esperantistoj de Tuluzo, kiuj preparas la paskan Sat-amikaran kongreson en Cap d'Agde . Posttagmeze ili detaligis la projekton kaj la nunan staton de la afero (loĝado, ekskursoj (St Guilhem, Mèze, Kanalo de la Sudo, ktp), prelegoj (certas la veno de Georges Kersaudy, aŭtoro de "Langues sans frontières", ankaŭ de André Cherpillod), koncertoj (de Jomo), informado de la feriantoj de la ferivilaĝo, ktp . Estas bezonataj homfortoj por diversaj taskoj dum la kongreso . Sin anonci al la federacio . Pluraj el la partoprenantoj de la kunveno promesis helpi laŭpove . Pri tradukoj de dokumentoj kontribuos la grupoj de Béziers kaj Montpellier . *Ni realigos broŝuron por la kongresanoj, donacotan al ĉiuj kongresanoj (pri Agde, Béziers kaj ĉirkaŭaĵoj).* Koncerne la subtenon de oficialaj instancoj estas problemo pri la municipo de Agde, kie oni baldaŭ rebalotos . Pri la departemento Hérault (Ĝenerala Konsilantaro) kaj la Regiono, ni informiĝos pri dosieroj por financa helpo . Estas pretaj la glumarkoj por anonci la kongreson (vidu sur la frontpaĝo); vendiĝas kelkaj folioj kun 21 glumarkoj . Ni restos en rilatoj kun J/M. Lafosse por la sukcesigo de la kongreso de Sat-Amikaro kaj laŭeble pli detale informos en la venonta SFS .



**BÉZIERS**

Jam en septembro la serioza laboro komenciĝis . La "Aleoĵ de asocioj" okazis la 14an de septembro . Multaj gapantoj . Pluraj petis informojn . Ĉu ili studos ? Ni vidos !

**Kunvenoj :** Ili okazos la **12an de oktobro**, la **16an de novembro**, la **11an de januaro** . La kunveno de januaro estos nia ĝenerala kunveno . Ne forgesu partopreni en ĝi ! Klopodu por ĉeesti ĉiujn kunvenojn : unu fojo en la monato ne estas multe !

**Zamenhofa Tago :** la **7an de decembro** ekde la 10a horo . Komuna manĝo, distra posttagmezo . Se vi deziras manĝi kun ni, avertu nin sufiĉe frue, por ke ni povu mendi la ĝustan nombron da manĝoj (ni devas pagi la menditan nombron !) . *Ĉuj estas kore invititaj* .

**Kursoj :** La 2a kaj 3agradaj kursoj komenciĝis la 4an de oktobro je 14h30 en MVA (por la 3a) kaj sur strato Picot (por la 2a) . La unuagrada estas antaŭvidita ĉiumerkrede je la 9a h (str. Picot) . Eble aliaj kursoj okazos laŭ la nombro kaj deziroj de la lernantoj .

**Staĝo :** Ĝi disvolviĝos de la **14a ĝis la 21a de majo** en Vias aŭ Cap d'Agde . Ni ankoraŭ ne povas doni pliajn informojn . Certe ili estos pretaj por la venonta SFS . Sed de jam, rezervu tiun semajnon de majo por plibonigi vian scipovon kaj pasigi agrablajn tagojn kun ni .

**MONTPELLIER**

**Centre Culturel :** La nova adreso de la Kultura Centro kaj de ties prezidantino Annick Tora estas **Résidence les Collines d'Estanove J - C2bis - 71,rue René Clair 34070 Montpellier Tel-n° : 04 67 69 11 32**

**Forumo de asocioj :** kompleta fiasko, ĉar pluvadegis/pluegadis kaj la forumo haltis antaŭ tagmezo . Espereble la tago de malfermitaj pordoj en Ĉies domo "L'Escoutaire" ebligos konigi nin al la anoj de tiu asocia centro .

**Kursoj :** (informoj kun rezervoj) Ĉiujfaŭde en "L'Escoutaire" : ekde 9h15 : komencantoj kun Jeanne Bès 10h30 : progresantoj kun S-roj Defoly kaj Martinez / Ĉiuvendrede en UTT, salono Pétrarque, 9h : inicado kun Rosa Aumeunier . Aldone konversacia kurso ĉiun lundon vespere ĉe J. Boccadifuoco kun Hanna Cayzac (18 h ?)

**Kunvenoj :** Sabate en "L'Escoutaire" de 10h ĝis 14h30 (kunveno + komuna tagmanĝo). **Datoj :** 9a de novembro, 7a de decembro (konfirmota), 11a de januaro, 8a de februaro, 15a de marto, 12a de aprilo, 10a de majo, 7a de junio . *La 5an de oktobro kunvenis 13 personoj, tri senkulpiĝis pro malsano, Sro Diez pro la forpaso de sia edzino . Ni ĉuj kondolencas lin tutkore . La prezidantino informis pri diversaj staĝoj kaj kongresoj, ni interkonsentis pri kursoj kaj poste ni gaje tagmanĝis kiel kutime .*

**Réinsertion et Espéranto**

RE organizas staĝon pri tradukado kaj gramatiko en Montpellier de la **29a de oktobro** ĝis la **3a de novembro** . Gvidos la staĝon André Cherpillod, Akademiano . Informas RE 26, rue Enclos-Fermaud 34000 Montpellier, tel 04 67 75 62 98 .

RE sendis dupaĝan cirkuleron por peti monsubtenon de ĉiuj esperantistoj "por daŭre disvastigi la projekton" . La kompleta teksto \* estas havebla de SFS . La ĝenerala kunveno de la asocio okazos la 9an de novembro je 14h30 en la sidejo .

Lastjare (temas pri lerneja jaro) Zohra, la sindonema dungitino de RE, instruis esperanton en kolegio "Les Oliviers" de Nîmes kaj al klaso de Liceo R. Schuman en Avignon (ĉi-poste bildo de la liceanoj) . Ekestis projekto partopreni la venontan "Euroscola" en Strasburgo, sed ŝajne ne partoprenos E°-klasoj .



## AUDE

Nia amiko W. Lutterman tradukas regule en esperanton paĝojn de "Le Monde Diplomatique". Tiuj paĝoj estas konsulteblaj rete ĉe [http://membres.lycos.fr/vilhelmo/le monde diplomatique.htm](http://membres.lycos.fr/vilhelmo/le_monde_diplomatique.htm)

"Esperanto Pyrénées", organo de la esperantistoj de Ariège, mencias du kontaktadresojn pri kursoj, ekspozicioj en Aude (verŝajne en la okcidenta parto) : Christian Pons 04 68 60 57 51 kaj Yvette 04 68 60 50 97

**Staĝo** : Kiel anoncote en la lasta SFS, CEEA organizas trioblan staĝon (pri Eko-turismo, Koruso-trejnado, inicado al E<sup>o</sup>) en La Freychède (Montferrier) de la 27a de oktobro ĝis la 2a de novembro . Petu la kompletan aliĝilon\* de SFS (en esperanto aŭ en la franca) aŭ plenigu tiun de la p. 6 .

## LOZÈRE

Francis kaj Monique Bernard estas la novaj respondeculoj de "Esperanto Info", inform-revuo en la franca pri la internacia lingvo, speciale por ne-esperantistoj, komencantoj aŭ esperantistoj, kiuj bezonas freŝajn argumentojn . Ni deziras al ili bonan sukceson en tiu entrepreno .

## PYRÉNÉES-ORIENTALES PERPIGNAN

**Honorigo** : S-ro Aillagon, Ministro pri Kulturo kaj Komunikado, informis en julio René Llech-Walter pri la atribuo de la rango de oficiro en la ordeno de Artoj kaj Beletristiko pro lia kontribuo al la disinfluo de kulturo en Francio kaj la mondo . Ni kungratulas nian Honor-prezidanton pro tiu alta distingo .

**Renkonto** : Dum vizito de Umberto Eco (inter aliaj aŭtoro de "Serĉado de la perfekta lingvo", kie li mencias favore esperanton) okaze de "Prix Méditerranée 2002", Jean Amoureux povis interparoli kun li kaj menciis sian esperantistecon . Umberto Eco preparas nun libron pri tradukado kaj tradukarto .

## PRADES

Fine de julio (vidu ankaŭ p.7) disvolviĝis E<sup>o</sup>-semajno en Valmanya .En "La semaine du Roussillon" de la 29a de aŭgusto aperis longa artikolo (vidu dekstre) pri E<sup>o</sup>. Aperis poste reĝustigo pri C. Pasqua kaj H. Désir, laŭ kiu tiuj du Eŭropaj deputitoj ne estas esperantistoj, sed ke iliaj grupoj apogas E-on . Inicad-kursoj funkcias ĉiumerkrede (20h30) ĉe asocio Mosaïque, 85 Rue du Palais de Justice . Tiu asocio permesis al Christian Pinard meti informilojn kaj afiŝojn pri E<sup>o</sup> sur budo dum la konata Foiro-ekspozicio . CP estis ankaŭ antaŭ nelonge intervjuita de "Radio Bleue Roussillon" kaj prelegos pri E<sup>o</sup> la 24an de oktobro por la asocio ALEC . Imitinda aktivulo ! Bonan sukceson al la provo konigi E-on en "Conflent" (ĉu "kunfluejo" ?)

### HELPOPETOJ DE 2 E<sup>o</sup>-INSTRUISTOJ

**EL UZBEKIO** : S-ro Eugeno S.Perevertajlo instruas en la universitato de Taŝkent . Li provas trovi gesamideanojn, kiuj bonvolus skribi al iu el liaj studentoj, kiuj studas la francan lingvon . Li promesis al siaj studentoj, ke per E<sup>o</sup> ili trovos francajn esperantistojn por helpi ilin en la studado de la franca lingvo . [eugeny@gimli.com](mailto:eugeny@gimli.com) / adreso en Jarlibro .

**EL KUBO** : José de J. Campos Pacheco estas juna instruisto, kun 9-12 jaraĝaj gelernantoj . Li serĉas kolegojn por kunlabori kun liaj klasanoj . Speciale interesas ilin marionetoj . Petu de SFS kopion de lia interesa letero .  
*Anticipan dankon pro via helpo !*

La Semaine du Roussillon N°332

## On parle esperanto dans le Conflent

**L**a passion de Christian Pinard pour l'espéranto date d'un an. Il a appris la langue internationale très facilement et très rapidement en quelques leçons. Christian Pinard ne tarit pas d'éloges sur cette langue prodigieuse. "Après 10 leçons sur Internet, j'ai été capable de lire un livre en m'aidant d'un dictionnaire, et de tenir une conversation en espéranto avec une institutrice italienne sur le thème de la responsabilité civile des instituteurs en Italie. Alors qu'avec 5 ans d'anglais scolaire, je baragouine !

L'alphabet s'apprend en 15 minutes et la grammaire ne comprend que 16 règles. En parlant français, on connaît déjà les 3/4 de l'espéranto. Il y a très peu de racines à apprendre, les mots se construisent par agglutination (collage) avec quelques affixes.

On estime que 15 millions de personnes parlent l'espéranto dans le monde. Au Conseil de l'Europe, 85 députés sont espérantistes dont Charles Pasqua et Harlem Désir, preuve que la langue créée en 1887 par Zamenhof a une vertu de rapprochement humaniste ! Quant au Conflent, si les initiés sont encore peu nombreux, elle était enseignée à Prades à la fin des années 40. Au cimetière pradéen se trouve la tombe d'Auguste Carrer, instituteur à Saïgon qui y avait créé la première école d'espéranto en 1905. Très utilisée en Chine et en Asie, elle peut servir de langue-pivot notamment dans la recherche scientifique."

En septembre, Christian Pinard sera invité par l'ALEC à faire une conférence sur l'espéranto et veut organiser une initiation gratuite. Vous pouvez le contacter au 04 68 05 24 41.

**CĖEA (Cercle d'Etudes  
Espĕrantistes de l'Ariĕge)**  
Mairie – 09340 VERNIOLLE



3 staĝoj  
de 27-a de oktobro  
ĝis 2-a de novembro 2002

ESPERANTO por komencantoj  
TURISMO pluigebla  
KORUSO

**STAĜEJO** : en feriejo La Freychède  
FR - 09300 MONTFERRIER (vidu  
reklamon en kongres-libro de 83-a UK en Montpellier)  
(novaj gastestroj – manĝoj sen OGM/GMO-oj)

Venu kun malfermaj okuloj, oreloj, sensoj,  
sentoj, sencoj...  
por riĉigi la staĝon kaj de ĝi riĉiĝi !

**HORAROJ** : ĉiutage 5 horoj da studado +  
ripozo, vizitoj, ludoj, spektakloj, prelegoj,  
koncertoj... laŭ viaj afablaj proponoj kaj niaj  
zorgaj klopodoj.

**AKCEPTO** : 26-an de oktobro ekde 15-a horo  
**STUD-EKO** : 27-an de oktobro ekde 8-a 30.  
**STAĜ-FINO** : 2-an de novembro post tag-  
manĝo

**MEMBRIĜO al CĖEA** :  
(deviga por asekuo kaj pro ĝi CĖEA sendos al  
vi 4 numerojn de la loka du-lingva esperanto-bulteno  
« Esperanto-Pyrĕnĕes ») :

- normala : 16 Eŭroj
- paro : 24 Eŭroj
- malpli ol 16-jaruloj : 5 Eŭroj

**ALIĜO al iu STAĜO** : rabatitaj prezoj laŭ  
aliĝdato, aĝo, nombro de sama familio

KIUJ KIAM	Plen- kresk- uloj	antaŭ 26 jaroj aŭ 2-a persono	antaŭ 12 jaroj aŭ 3-a persono
ĝis 26-a junio	36 Eŭr	24 Eŭroj	12 Eŭroj
ĝis 26-a aŭgusto	48 Eŭr	36 Eŭroj	24 Eŭroj
ĝis 26-a okto	60 Eŭr	48 Eŭroj	36 Eŭroj

Rimarko : akompanantaj ne-staĝanoj  
membriĝu sed ne aliĝu

**RESTAD-KOSTOJ** :

Tuta restado (en plur-lita ĉambro) :  
182 Eŭroj

Tuta restado (sola en ĉambro) :  
262 Eŭroj

Tuta restado sen tagmanĝoj : 155 Eŭroj  
Nur tagmanĝoj : 70 Eŭroj



Unua staĝo :

**ESPERANTO  
POR KOMENCANTOJ**

*Rikardo CASH*

Instruos esperanton al komencantaj kaj duon-  
komencantaj plenkreskuloj kaj junuloj ekde 16-  
jaraj (ludoj, amuziĝadoj, babilado)

Dua staĝo :

**EKO-TURISMO**  
(la “temo de la jaro”)

Inter intimeco de “Pasporta Servo”, kaj “Amikeca Reto”  
kaj taĉmentecaj invadoj per busaroj, ĉu eblas EKO-  
TURISMI ?

... Kiel ? – Kiom ? – Kie ? – Kiam ? - ...

*Anne AMBLES*

Profesiulino pri ĉiĉeronado, lingvistiko, art-historio ...  
trejnos vin teorie, ankaŭ praktike por ne nur turismi, sed  
ankaŭ por akcepti, akompani, gvidi ... turismanojn, kun  
kultura respekto. Ŝi ĉion prezentos per bonkvalita  
esperanto-lingvo, ne tro alt-nivela.

Tria staĝo

**11-a KORUSO-STAĜO**

*Petro DE SMEDT*

Flandra kariljonisto jam gvidis nin antaŭ 10 jaroj  
kaj tiam kuntradukis lokan himnon “se canto/se  
kanti”. Li revenas kun novaj kantoj plur-voĉaj.  
Jam aliĝis lokaj gekorusanoj eĉ korusestrino .. ĉu  
ankaŭ vi ? ...

*Petu aliĝilon de SFS*

## SOMERAJ EVENTOJ

### ALICANTE -75a KONGRESO DE SAT-

De la 1a ĝis la 7a de julio 2002 okazis la 75a kongreso de SAT ĉe la Alikanta Universitato de Sankta Vincent de Raspeig en kiu ni loĝis. El 204 enskribitaj, 138 partoprenantoj (Afrikanoj kaj Ĉinoj ne povis ricevi la vizon por eniri Hispanion) el 18 malsamaj nacioj partoprenis en la kongreso (inter ili 64 Francoj, 25 Hispanoj...)

Dum la ĝenerala kunveno aŭ en frakcioj, ni ĉiumatene parolis pri la interna funkcio de SAT kaj ĝia partopreno en la problemoj ekzistantaj tra la mondo. La laboro estis fruktodona. La diversaj opinioj, esprimitaj foje vigle, kontribuis al la riĉigo de SAT.

Michel Duc-Goninaz prezentis la novan PIV-on. Estis grava momento de tiu kongreso. La modernigo, renovigo de Piv post la eldono de G. Waringhien estis utila. Estas finatingo de longa laboro, kiu komenciĝis en 1990. Multaj fakuloj kunlaboris por tiu grava korektado, ĝisdatigo kaj fine represado. La rezulto estas tre bela libro en ĝia aspekto kaj ĝia enhavo. Ĝi estas necesa por la uzo kaj la evoluo de la lingvo mem.

Dum la antaŭkongreso kaj la kongreso, ekskursoj estis organizitaj en Valencia, Alicante, Elche, Guadalest, la groto de Kanalobre, Benidorm. Ni malkovris belan landon kun ĝiaj palmoj, citron-arboj, oranĝarboj, floroj, ĝia luksa vegetalaro, ankaŭ sed ne tro allogaj, similaj "usonaj" konstruaĵoj el betono.

En restoracio de Benidorm ni festis la datrevenon de Martin Bustin, la organizanto de tiu kongreso. La kongresanoj de la diversaj nacioj kantis en siaj landlingvoj "Gajan datrevenon". Tiu malsimileco konsciigis al ni pli profunde pri la homa valoro de Esperanto.

Teatraj prezentadoj de la pola Jerzi Fomalova, folkloraj dancoj de grupo "Andalusie", prelegoj, agrabligis la vesperojn.

La kongreso finiĝis en agrabla etoso, kiel dum la tuta kongreso, per "ĝis revido en la venonta jaro en La Chaux de Fonds en Svislando!"

3 CBE-aninoj : Dalia, Line, Mado

### VALMANYA (P-O)

(artikoloj aperintaj en "L'Indépendant". Foto de la partoprenantoj akompanis la duan artikolon)

### Des rencontres de jeunes espérantistes

Prochainement, du 22 au 28 juillet, se déroulera la 6<sup>e</sup> rencontre de l'Association du mouvement espérantiste. A cette occasion, une trentaine de jeunes résidera à Valmanya et en profitera pour découvrir la région. Le Pradéen Christian Pinard accompagnera les visiteurs lors des balades en Conflent.

Le programme de découvertes est d'ores et déjà bouclé. Bien entendu les espérantistes profiteront de la nature généreuse de Valmanya, de son patrimoine minier, mais se rendront également à Collioure et Céret. Mais surtout, dans les pas de Christian Pinard, ils graviront le Canigou et s'offriront en fin de séjour une grande visite pradéenne ainsi qu'une balade autour des abbayes et églises romanes conflentoises. Et comme on dit en espéranto: "Bonvenon al cinj". (زنج)



### Les espérantistes réunis en Conflent

Le grand rassemblement annuel, organisé par le responsable de la "Esperanta movado asocio", le Bordelais Jean-Luc Berard, a réuni durant une semaine des enseignants, des familles espérantistes, venus d'Italie, d'Ecosse, de tout l'Hexagone. Valmanya a été le siège de cette 6<sup>e</sup> rencontre internationale de l'Association du mouvement espérantiste. Un rendez-vous que les espérantistes pradéens et conflentoises ont animé.

Les visiteurs ont profité de l'occasion pour découvrir le patrimoine local, quelques sites au cours de randonnées. Ces découvertes se sont faites bien entendu en toute amitié avec pour langue commune l'espéranto. Des flancs du Canigou en passant par la vallée du Tech, les abbayes de Saint-Michel-de-Cuixà et de Saint-Martin-du-Canigou jusqu'au samedi des Producteurs, les espérantistes de tous âges ont pleinement partagé ces journées. Tous se sont déjà promis de se retrouver l'été prochain pour un nouveau grand rassemblement. En attendant, les cours d'espéranto continuent à Prades durant tout l'été. Renseignement auprès de Christian Pinard au 04 68 05 24 41.

### FORTALEZA (BRAZILIO)

Ah, Fortaleza! Senfina bluverda oceano borderita de senfinaj plaĝoj el ora sablo. Palmoj kaj aliaj ekzotaj arboj. Niaj altaj hoteloj en laŭoceana promena strato. Temperamentaj, gajaj, amikiĝemaj, bonvolemaj brazilanoj. Ŝoforoj zigzagantaj inter aŭtoj kaj mirakle sukcesantaj tuŝi neniun. Bazarego de manartaĵoj, mirinde malmultekostaj, kreitaj de lokaj lertuloj. Fiŝoj, fritataj por ni sur la oceana bordo. Ah, tropikaj fruktoj! Ah, brazila kafo! Ah, brazilaj vinoj!

En kiu Universala Kongreso gejunuloj konsistigas trionon de la partoprenantaro?

En kiu Universala Kongreso oni povas vidi dekojn da knaboj kaj knabinoj, junuloj kaj junulinoj en verdaj ĉemizoj kun la kongresa emblemo, ĉiam pretaj por helpo?

Kie troveblas tiom da entuziasmaj kaj idealismaj esperantistoj? Kie lokaj esperantistoj salutas konatajn kaj ekkonatajn homojn per kiso kaj brakumo?

En kiu Universala Kongreso oni ne kontrolas kongresanecon antaŭ la vesperaj koncertoj, tiel ke ilin povas viziti tutaj familioj, inkluzive grandaĝajn avinjojn kaj bebojn?

En kiu Esperanto-aranĝo eblas spekti dum koncerto spirhaltigan kaj dancigan karnavalon? En kiu Universala Kongreso la publiko reagis al kantoj per aplaŭdegoj, aprobaj fajfoj kaj krioj, kvazaŭ en futbala matĉo? Kie gitarantaj kanzonistoj sukcesas kunkantigi milopan aŭskultantaron?

En Fortaleza, ĉi-jara ĉefurbo de Esperanto-lando. Neforgesebla Fortaleza. Neforgesebla Brazilo.

Boris Kolker, porĉiama fortalezano enanime

## IMPRESOJ DE BRAZILO

Ni partoprenis en la 87a kongreso en Fortaleza, Brazilo kaj poste en la postkongreso organizita de UFE . Pri tiu kongreso vi jam povis legi en aliaj Esperanto-revuoj, do ni rakontos pri aliaj impresoj . La turisma urbo Fortaleza situas nur 4 gradojn de la ekvatoro, tio signifas, ke malgraŭ la vintra periodo la temperaturo dumnokte estis 24° kaj tage ĝis 34° . Ŝajne la minimuma temperaturo dum la tuta jaro tage estas 26° . La sunleviĝo kaj la sunsubiro okazas la tutan jaron je la 6a horo matene kaj vespere . Multe da enloĝantoj (2,5 milionoj) vivas kaj sportas ekstere sur la plaĝo kaj la promendigo . Ni rimarkis, ke multe da domoj, vendejoj kaj restoracioj eĉ ne havas fenestrojn kun vitroj . Loĝantoj de apartamentoj dormis sur siaj terasoj en hamakoj . Ne nur la esperantlingvaj Brazilanoj (+800 partoprenis en la kongreso) sed ankaŭ la aliaj estis simpatiaj . Ni partoprenis en multe da ekskursoj, tiel ni admiris la belegan naturon de la ĉirkaŭaĵoj (plaĝo kaj grandaj, altaj sablodunoj) . Ni admiris la arkitekturon de altaj apartamentoj (de 25 ĝis 30 etaĝoj) : la nereкта formo, kolorita kaj ĉirkaŭita de ĝardenoj aspektis ege pli bela ol tio, kion ni vidas kutime en Francio kaj Belgio . Ni ĝuis la etoson dum la kongreso kaj postkongreso (la aliaj UFE-karavananoj bone komprenis, ke ni preferis konversacii en esperanto ol en la, por ni malfacila, franca lingvo . Koran dankon, gesamideanoj !

Marlène kaj Arie Bouman, Portiragnes/Francio kaj Gent/Belgio



←  
Marbordo de  
Fortaleza .



→  
Akvoŝalajtoj de  
Iguacu .

## VERONA : SA EŬROPUNIA KONGRESO

Aliĝis preskaŭ 300 homoj, partoprenis 250, el 25 nacioj (4 homoj el nia regiono, 2 junaj Ĉinoj la lastan tagon) . La fakto, ke jam okazis simila kongreso tie antaŭ 10 jaroj, ke la UK disvolviĝis 3 semajnojn antaŭe, klarigas parte, kial ne estis pli ampleksa partoprenantaro . Mankis homfortoj en la organizanta skipo, tiel ni ne ricevis la liston de la aliĝintoj kaj ni devis stari dum pli ol duhora koncerto pro manko de seĝoj ! La loĝado estis kosta, feliĉe ni trovis solvon ekstere de la urbo . La kongresejo estis tutnova konstruaĵo de la universitato, bonege ekipita . Kaj kompreneble la urbo de Romeo kaj Juliet' estas vere vizitinda . Amika etoso kiel ofte en mezgrandaj kongresoj . Interesaj prelegoj de H. Tonkin, J. Wells, C. Longue-Épée, D. Ferguson, 20jara franco Xavier Dewidehem (komitatano de UFE kaj respondeculo de Euroscola), ktp . Ni ne partoprenis la programitajn ekskursojn, ĉar ni mem vizitis la regionon per propra veturilo kun geamikoj . Parenteze pli utilas la germana lingvo en la bela lagregiono, kiun ni detale vizitis antaŭ kaj dum la kongreso, ol la angla aŭ la franca ! En la fina rezolucio ni proponis, ke en la baldaŭa Eŭropa konstitucio estu mencio pri la lingva problemo kaj la egalrajteco de Eŭropanoj . La venonta Eŭropunia kongreso okazos en 2004 en Bilbao, do proksime de sudokcidenta Francio .

J. Héning

## SÈTE

Kiel ĉiuj scias, la 28a Internacia Semajno de Sète okazis fine de Aŭgusto . Kiel ĉiam, ĉio iris glate ! Sed tamen "glate" estas stranga esperanta vorto . Nur unu semajnon antaŭ la staĝo, ni ricevis retleteron de Rusino loĝanta en Hispanio, kiu deziris partopreni la staĝon . Ni respondis : "Sendu antaŭpagon kaj ni rezervos vian ĉambrojn" . Ŝi nur sendis novan mesaĝon (sen mono) : "Bone ! Mi alvenos sabaton je la dekkvina" . Feliĉe ŝi alvenis . Dum la interkona vespero, je la 9a vespere, ni rimarkis nekonatan junulparon funde de la ĉambro . Ni opiniis, ke ili eraris pri la loko . Sed tute ne ! Ili alvenis el Rusio, kaj volis partopreni la staĝon, tute simple . Sed neniam ili sendis aliĝilon aŭ leteron . Feliĉe afabla partoprenanto proponis loĝigi ilin en sia dormoĉambro, atendante la malfermon de la akceptejo (estis sabato vespere) . Do, ĉijare kiel kutime, ni akceptis kelkajn eksterlandanojn : unu rusdevenan Hispaninon, du ge-Rusojn, tri ge-Germanojn, Ges. Guzzi el Italio, Stefan MacGill kaj lian familion (la patro estas de novzelandanda deveno, la patrino kaj tri filinoj hungaraj) . Entute ni estis 44 partoprenantoj, ĉirkaŭ 30 partoprenis la kursojn . 4 niveloj estis proponitaj : supera kun Pierre Babin, paroliga kun Mario Guzzi, meza kun S. MacGill kaj inica kun Jorgos Comte . La etoso estis agrabla dum la kursoj kaj ankaŭ ekstere de la kursoj . (daŭrigo sur p. 9a)



### NELACIGEBLA VOJAĜEMULO .

Nia veterano (89jara) kaj amiko Gustave Blary (Arles) post partopreno en la fervojista kongreso en Bulgario, pasigis tri semajnojn ĉe sia amiko Petko Arnaudov, kiun li ekkonis dum la UK de Sofia en 1963 . Li estis intervjuita de ĵurnalistino por la ĉiutaga gazeto "La Lumo" . En longa teksto \* li rakontas, ke li estas jam vizitinta 45 kongresojn kaj 54 landojn (Ĉu rekordo ?) . Lia preferata urbo estas Quito (Ekvadoro), ĉar tie la ĉielo estas ĉiam blua kaj neniam pluvas . La nekonata lando, kiun li ŝatus viziti estas... la luno ! Laŭdire tiu vojaĝo estis lia lasta vojaĝo sed, kiam oni konas Gustave, la eternan junulon mense, oni povas dubi pri tiu aserto



**SÈTE**.../... Samtempe kiel la staĝo okazis en Sète la granda festo de "Sankta Ludoviko" (Ĉu Zamenhof?) Oni povis rigardi ludbatalon sur ŝipoj, piroteknika-ĵojn, aŭdi muzikon, ktp. Pierre piede gvidis aliajn partoprenantojn ĝis monto S-ta Ludoviko (Ĉu ankoraŭ Zamenhof ?) tra sekretaj vojetoj .

Tiuj, kiuj ŝatas varmetan eĉ malvarman akvon, profitis de la plaĝo (la maro, ankoraŭ ĉijare kuŝis apud Le Lazaret). Escepte de tiuj, kiuj partoprenas jam de 28 jaroj, oni malkovris setajn kvartalojn . Kompreneble kelkaj pigruloj ne forgesis siesti... Post la vespermanĝo ni ludis, kantis, vidis tre amuzajn skeĉojn de S. MacGill kaj de liaj filinoj, sed mankis la lumbilda vespero . Ankaŭ ni aŭskultis prelegon pri la ĉiutaga vivo en nuna Rusio. Kaj kompreneble ni multe babiladis, ridis, eĉ drinkis . Ankoraŭ ĉijare la diversnaciuloj (kaj eble ankaŭ la bona vino) bremsegis la krokodiladon . La kutima brazukado daŭris preskaŭ ĝismatene, tamen eĉ tiuj, kiuj ne povis dormi pro la ridado, kantado kaj laŭta babilado ĝojis pri la esperanta sono tra la nokto. La venonta staĝo okazos inter la 23a kaj 30a de aŭgusto 2003 en la sama loko . Venu multnombre !

Evelyne kaj Nikolao

### ASTRONOMIA STAĜO

Inter la 7a kaj 14a de septembro okazis la 3a astronomia staĝo de AEK (Astronomia Esperanto-Asocio) en observatorio Sankta Mikaelo (Francio) . La titolo de la staĝo : Astronomio, amatoroj kontribuas . Du AEK-anoj : Dro Aleksander Mikiŝev el Israelo, fondinto de AEK ([www.esperanto.org/AEK](http://www.esperanto.org/AEK)) kaj Saito Yoŝinori el Japanio (Tokio) gastis ĉe montpellieraj geesperantistoj, ankaŭ AEK-anoj Witold Cayzac kaj lia patrino Hanna, dum du tagoj, la 14a kaj 15a de septembro . Tio estis bona evento por organizi renkonton kun kelkaj lokaj geesperantistoj kaj por komuna manĝo, kafumado kaj babilado . Eksterlandaj samideanoj tre ĝojis konatiĝi kun francaj geesperantistoj kaj revenos por la 4a staĝo de AEK, kiu sekvajare okazos ankaŭ en Francio .

### BOURESSE

En Aŭgusto en suda Francio la varmego ne estis eltenebla . Jacqueline, Maurice, Jorgo kaj Josée veturis al Bouresse, por partopreni staĝon pri preparado al la Kapableco . La vetero tie seniluziigis nin, ĉar dum la tuta daŭro de la staĝo ni bezonis jakojn kaj puloverojn . Feliĉe la varmeco de la etoso revigligis nin . La gastigantino Suzanne Bourrot, tre afable akceptis nin kaj tuj oni sentis sin senĝene . Tamen la unuaj manĝoj estis iomete silentaj; ĉirkaŭ granda tablo troviĝis 13 geesperantistoj, la plej juna el ili estis 13jaraĝa knabino . Sed la bonegaj kursoj gvidataj de Georges Lagrange kaj la bona manĝaĵo malligis la langojn . Poste, la etoso iĝis pli kaj pli varma .

Je la komenco la kursoj estis malfacilaj, ĉar Georges tro flue kaj rapide parolis por ni . Kiam Jorgo petis de li malrapidigi la ritmon, falis la bariloj kaj la kursoj estis fruktodonaj .

Dankon al Georges kaj Suzanne, kaj ĝis la venonta staĝo por la unua, dua kaj tria gradoj, kiu okazos de la 28a de oktobro ĝis la 2a de novembro .


J. B.

NDLR : Samloke disvolviĝos en decembro (10-15 XII) alia staĝo pri "Jarcento de esperanto tra la verkoj de Valo". Valo - ĉu necesas diri? - vivis en nia regiono, pli precize en Nimo .

## UK : UNIVERSALAJ KONGRESOJ KAJ ALIAJ

La lasta UK kunigis proksimume 1500 esperantistojn el 58 landoj . La pripensinda temo de la kongreso estis "diverseco : ŝanco, ne minaco" . Por la unua fojo eblis sekvi la kongreson distace, dank'al la kongresa kuriero surrete : "La bela sonĝo de l'...Omaro" (vidu la bildon dekstre) . Parto de la kongresa rezolucio jen tekstas :

-La 87a UK konstatas, ke la principoj kaj celoj de Unesko kongruas kun la idealoj de la movado por Esperanto, kiu celas per neŭtrala komunikilo transponti la kulturojn, tiel kreante forumon por egaleca interŝanĝo de kulturaj valoroj -atentigas en tiu kunteksto pri la graveco de la lingva dimensio de kultura diverseco, kaj substrekas la pretecon de la E°-movado kunlabori kun ĉiuj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri la kultura dimensio en internaciaj aferoj . La kompleta teksto de la rezolucio en la franca, esperanto kaj la angla estas havebla de SFS\* .



87.a Universala Kongreso  
de Esperanto

Fortaleza-Brazilo  
03-10 agosto 2002

\* \* \*

Reprezentis Unesko-n Patrick Gallaud (Francio), kiu tiel entuziasmiĝis pri E°, ke li eklernis ĝin per fulmrapida Ĉe-kurso kaj kapablis fine de la semajno alparoli la kongresanaron en flua esperanto ! Li ankaŭ promesis ("Heroldo" 2023) daŭrigi la lernadon, ĉar "E° estas pli ol lingvo" kaj "grava ilo por la internacia komunikado" . Li ankaŭ proponis "enskribi E-on en la liston de Unesko pri la nemateria havaĵo de la homaro" .

\* \* \*

Post Fortaleza (Brazilo), Göteborg / **Gotenburgo (Svedio) de la 26a de julio 2003 ĝis la 2a de aŭgusto** .

Aliĝiloj estas jam haveblaj \* aŭ rete pleneblaj (<http://www.uea.org>) . La unua aliĝperiodo etendiĝas ĝis la 31a de decembro : por individua membro de UEA 150<sup>E</sup>, kunulo, junulo 75<sup>E</sup> .

La unua bulteno jam aperis kaj enhavas detalan planon pri la urbocentro de Gotenburgo kun 2100 ĉambroj de hoteloj en 5minuta promendistanco, 3300 en 20minuta promendistanco kaj 8600 en 30minuta radio per tramo kaj buso . Se vi timas la distancon per veturilo, sciu, ke aŭtoŝoseoj kondukos vin rekte al Gotenburgo .

El Parizo ruliĝas busoj de Eurolines . Se vi timas la altajn vivkostojn en Skandinavio, sciu, ke ekzistas en Gotenburgo hotelo "Formule 1" kaj kampadejo kelkajn minutojn de la kongresejo . Kaj fine, se prelegoj kaj kunvenoj tudas vin, la Liseberg-amuzparko troviĝas tute apude de la kongresejo kaj la urbocentro ne estas tre malproksima . Rilatu kun SFS, se vi intencas partopreni la 88an UK .

\* \* \*

Glumarkoj de la UK 2003 estas mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA (aŭ UFE) . Unu folio kun 12 markoj kostas 1,20<sup>E</sup> + sendkostoĵo. Bela afiŝo (formato A1) estas havebla kontraŭ pago de la sendkostoĵo (3<sup>E</sup>) .

\* \* \*

**En 2003** ne mankas eblecoj, en nia regiono la staĝo de Vias (14-21 V) kaj la Semajno de Sète (23-30 VIII) .

La Sat-Amikara kongreso disvolviĝos ankaŭ ĉe ni (19-21 IV) . La kongreso de UFE/France E° *pentekoste ĉielire* kaj la Sat-kongreso somere ambaŭ okazos en verdaj oazoj, respektive Grésillon kaj La Chaux-de-Fonds .

La venonta kongreso de AFCE (francaj fervojistoj), malfermata al ne-fervojistoj, estos en Collonges la Rouge (Corrèze) de la 14a ĝis la 19a de marto . Kroatoj kongresos en Zagrebo (31 V), Hispanoj en Valencio (15-19VII) kaj Italoj en Ancona-Portonovo (27-31 VIII) .(aliĝiloj\* ĉe SFS)

\* \* \*

Kio pri plej proksimaj rendevuoj, ĉar **Esperanto vivas la tutan jaron** ?

Ni jam anoncis la Katalunan kaj Transpirenean kongreson fine de oktobro en Majorko en la lasta SFS, la staĝon pri tradukado en Montpellier kaj la 3 samtempajn staĝojn en Ariège ankaŭ fine de oktobro en tiu-ĉi SFS .

Tiam ankaŭ disvolviĝos staĝo en Bouresse .

Plej baldaŭ (fakte de la **19a ĝis la 26a de oktobro**) menciindas la 10a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en **Cambrils, provinco de Tarragona** (Katalunio) .

Partoprenos pluraj anoj de la grupo de Béziers kiel lastjare . Petu informojn de SFS\* aŭ telefone de Sro Luis Serrano (937275021) aŭ Santiago Torné (937253421), faksile 937314111 .

Aliĝkotizo : 24<sup>E</sup> . Kompleta pensio (por unu tago kaj unu persono en dulita ĉambro) : 30<sup>E</sup> - vere ne konkurencebla prezo- kaj 36<sup>E</sup> en unulita ĉambro (limigataj eblecoj por unulitaj ĉambroj) .

La semajno disvolviĝos en komforta Hotelo Daurada Park, ĉiu ĉambro havas sian terason aŭ balkonon . Milda klimato kaj trankvila loko en tiu sezono . En la programo : prelegoj, debatoj, kursoj, ekskursoj (4, unu tuttaga), interkonaj vesperoj (2), adiaŭa vespero kun gustumado de "cremat" (rumo bruligita) kaj muziko kun "havanaj kantoj" ...Esperanta familia etoso garantiita !

\* \* \*

Kaj fine, se vi deziras sugeston por la jarfino en varma lando, kie brilos la suno . Kial ne forlasi la nordhemisferan vintron por pasigi neforgeseblan tempon ...en Aŭstralio, ĉe la 19a Somerkursaro de Esperanto ? Ĝi okazos en la mirinda urbo Melbourne de la 5a ĝis la 17a de januaro 2003 . Detaloj ĉe SFS\* .

\* \* \*

**ĈIRKAŬ EŬROPO** : Post kvinjara vojaĝo (anstataŭ la planita 4jara) revenis Laurent, Gudule, 6jara Lola, 2jara Romain, Camille la fidela ĉevalino kaj la ruldomo .

**ZEO-J** : Raymond Boré malkovris, ke la plej norda ZEO ne estas en Narvik (Norvegio) 200 km norde de la Polusa Cirklo sed 1350 km pli norde (ankaŭ en Norvegio), 1250 km de la Norda Poluso (latitudo : 78°37'). Temas pri Esperantoneset (neset = terpinto) ĉe la orienta bordo de Dicksonfjord, inter Lyckholm-valo kaj... Ido-valo . Ĉar ofte estas malfacile trovi Zeo-jn, RB pensis pri simplaj urboplanoj (formato A4) kun indiko pri la ZEO kaj la ĉirkaŭaĵo . Pli ol 300 urboplanoj estas jam pretaj (120 por Francio) kaj je via dispono (481 Square Zamenhof 73000 Chambéry). La teksto "Kio estas ZEO-urboplano?" kun la plano de Bouresse estas haveblaj ĉe SFS\* .


**EŬRODEPUTITOJ** : Germain Pirlot ne plu okupiĝas pri la listigo de la Eŭrodeputitoj favoraj al E<sup>o</sup>, pro tio ke post ĉiu elekto estas rekomenda la laboro ! Li provas ĝisdatigi la liston de altlernejoj kaj universitatoj, kie E<sup>o</sup> estas instruata .

**RADIOSTACIOJ** : Kvankam RAI (Radio Aŭstria Internacia) ricevis la plej multajn reagojn de la aŭskultantaro de le E<sup>o</sup>-programoj, RAI baldaŭ ĉesigos la elsendojn en E<sup>o</sup>. Oni povas skribi al ORF / Frau General-direktor Dr. Monika Lindner/ Würzburggasse 30a / A 1130 Wien . Male estas konfirmitaj la elsendoj de Pola Radio nur en la germana, angla kaj E<sup>o</sup> .

**VIDEOBENDOJ** : "Pasporto al la tuta mondo" estas preta : 16 x 30minutaj lecionoj nur en esperanto, por komencantoj kaj eĉ spertaj esperantistoj . Konatiĝu kun la familio Bonvolo ! Nova filmo kun E<sup>o</sup>-komentario, 19minuta, temas pri varmaera balonado . Filmis profesia filmisto de la universitato de Liverpool . Prezo : 23<sup>E</sup> inkl. sendokoston. [indesigneko@aol.com](mailto:indesigneko@aol.com) aŭ petu detalojn pri la mendadreso .

"Mazi en Gondolando" estas denove disponebla kaj je reduktita prezo, nur 39<sup>E</sup> .

**NOVA BILDSTRIO** : Cisko kaj Vinjo ! (konataj ĉe ni sub la nomo Bob et Babette). La unua verko "La brusela bubo" en sufiĉe facila E<sup>o</sup>, amuza kaj agrabla por infanoj kaj por plenkreskuloj, estas mendebla ĉe FEL .



**KVINDEKJARA** estas la esperantista kulturdomo Greziljono . Por festi tiun datrevenon estis eldonita dika memorlibro, jam elĉerpita pro limigita eldonkvanto (100).

**RETA KURSO DE E-O** kun franca versio, kiu konsistas el 15 lecionoj kun demandoj, respondoj, dialogoj, esprimoj de la ĉiutaga vivo, sonregistroj por la 8 unuaj lecionoj, ekzercoj, "instruista estraro" por respondi demandojn, estas senpage elŝutebla ĉe <http://www.institutoesperanto.com.ar>

**E-O-INFORMCENTRO** malfermiĝis en Bruselo kaj estas je la dispono de la influa informrimedo de la Eŭropa Unio . Financa subteno de landaj asocioj kaj de individuaj esperantistoj estas dezirata .

**PLURLINGVECO EN EU** kostas oficiale 2<sup>E</sup> al ĉiu civitano de la Unio (verŝajne multe pli) sed 685 Milionoj da Eŭroj (kaj 193 M por 8 pliaj lingvoj) estas konsiderinda sumo kiam -sufiĉas 84<sup>E</sup> por 1000 saketoj da saloj por buŝa rehidratigo -sufiĉas 134<sup>E</sup> por ekipi akuŝistinojn -sufiĉas 17<sup>E</sup> por vaccine protekti unu infanon kontraŭ la 6 plej mortigaj malsanoj -sufiĉas 11<sup>E</sup> por resaniga nutrado de subnutrata infano dum unu jaro, ktp, ktp .

## PROBLÈME(S) DE LANGUE(S)

La presse a rendu compte cet été ("Midi Libre" du 30/7) de l'exigence de la Commission Européenne de faire étiqueter les produits alimentaires (vendus en France) dans "une autre langue facilement comprise" -comprenez l'anglais ! Concession : la composition des ingrédients pourra être en français . Le nouveau Secrétaire d'Etat au Commerce a décidé alors de maintenir l'obligation d'étiquetage en français, avec la possibilité d'ajout d'une ou plusieurs langues étrangères . En septembre, Mme Tasca, ancienne Ministre de la Culture et de la Communication, parlait de "renoncement linguistique supplémentaire" ("Libération" du 2/9) .

Affaire à suivre, si elle n'est pas déjà discrètement réglée . Petit à petit, la Commission Européenne (président : Romano Prodi -Italie ; vice-président : Neil Kinnock -GB) réussit à imposer la langue anglaise comme langue unique, l'allemand et le français étant pourtant les deux autres langues de travail dans les instances européennes . Ainsi, les dossiers des pays des candidats à l'élargissement de l'UE doivent être présentés en anglais, alors que certains de ces pays utilisent tout autant l'allemand, la langue la plus parlée de l'UE. Précision : Neil Kinnock a été le leader du parti travailliste mais son attitude concernant les droits linguistiques est bien peu progressiste, même s'il parle officiellement de plurilinguisme. A votre disposition le texte en anglais \* où il explique pourquoi l'emploi de l'espéranto dans les services de la Communauté n'est pas possible . Sur la page suivante vous trouverez le point de vue de P-M. Coûteaux, député européen, sur le manque de démocratie à Bruxelles ("Valeurs Actuelles" du 20/9) . Dans un article précédent il avait déjà signalé l'état de la communication entre les députés européens, spécialement en anglais .

**Au sujet de cette affaire, "Vox Latina" lance une pétition . Le message suivant suffit : "Je signe la pétition internationale "Pour la liberté de vivre en français en France" . Des commentaires peuvent être ajoutés; doivent impérativement figurer le nom, l'adresse du signataire, le pays .**

**VIVREenFRANCAIS@voxlatina.com ou Vox latina 42,avenue Montaigne 75008 Paris .**

Peut-il y avoir deux catégories de citoyens en France : ceux qui comprendraient l'anglais...et les autres ?

"Le Monde" doit imaginer aussi que tous ses lecteurs comprennent l'anglais et a décidé de mettre une fois par semaine un supplément en anglais ("New York Times"), sans traduction . Certainement "une ouverture sur le monde", comme l'affirme sa publicité . Autre nouvelle surprenante : l'Académie des Sciences a décidé de publier désormais ses compte-rendus en anglais...Enfin, la revue "Lire" de septembre, à l'occasion de la présentation d'un livre, ajoute que l'espéranto "semble avoir été relégué au rayon des rêves avortés" . Qu'en termes aimables et délicats ces choses-là sont dites ! Rebatoj kompreneble . "Lire" précise dans son n° d'octobre que Georges Kersaudy, le polyglotte aux 50 langues qui préconise l'E° (voir à son sujet la p. 3), a été interviewé lors de la parution de son livre "Langues sans frontières" . Raison de plus pour comprendre et informer correctement ! Nova rebato sekvos ! Il n'est de pire sourd que celui qui ne veut entendre !

Il y a aussi ceux qui parlent positivement de l'espéranto . Au tableau d'honneur de cet été, Michel Vincent, éditorialiste au "Pays Briard", qui parle favorablement de "la langue d'or" (édition du 2/8) . La conclusion de son long article : "Pourquoi les dirigeants de nos différents pays écartent-ils avec indifférence et mépris, sans se donner la peine d'y réfléchir une seconde, cet instrument de compréhension et de communication qui permettrait de faire tant d'économies et qui pourrait si utilement renforcer la cohésion de la famille humaine ? Mystère insondable de la sottise, nourrie de tabous, de conformisme et de routine, qui n'épargne pas les plus grands esprits . Pour les Européens, l'espéranto serait la langue d'or..." . On ne saurait mieux dire .

J.H.

P.S. Voyez page suivante ce que dit "Le Canard Enchaîné" de la chute de Vivendi et de M. Messier qui refusait "l'exception culturelle" à la française .

**Quand la Convention dialogue** : M. Giscard d'Estaing, président de la Convention Européenne ( à ne pas confondre avec la Commission Européenne) souhaite dialoguer avec les citoyens d'Europe, à la veille d'un nouvel élargissement (de 15 à 25 membres !) . Le dialogue sera ouvert sur internet, dans les 11 langues officielles de la Communauté, **de 18h30 à 20h le lundi 28 octobre** . Ne manquez pas l'occasion d'exposer votre point de vue et/ou de poser votre question . Longueur maximum du message : 265 caractères, soit 3 lignes .

[http://europa.eu.int/comm/chat/vge/index\\_en.htm](http://europa.eu.int/comm/chat/vge/index_en.htm)

Informations préalables : voir la page <Joining the chat>

Une compilation des questions et des réponses paraîtra ensuite .

**RAS dans l'espace aérien de New-York le 11/9** . C'est du moins ce qu'ont signalé les médias français .

La presse allemande a signalé deux incidents (document en allemand disponible\*) . Deux avions ont été déviés sur des terrains militaires, escortés par des avions de combat, etc . Le premier venait d'Asie; une dame, qui ne parlait pas anglais, a eu la malencontreuse idée de vouloir aller aux toilettes ... Dans le deuxième, un Airbus en provenance de Lisbonne avec 235 passagers, problèmes de compréhension entre le pilote et la tour de contrôle... Si vous vous rendez aux USA, le plus grand risque est celui... d'une communication difficile .

# Shakespeare La faute à

**P**AS facile tous les jours de diriger la calamiteuse conférence de presse téléphonique tenue, le 14 août, par Jean-René Fourrou, après la présentation des comptes de Vivendi. Loïn de rassurer les analystes, la presse et les épargnants, les déclarations du nouveau président du groupe, faites en anglais, ont accéléré la chute du titre en Bourse. Explication, le lendemain, d'un collaborateur de Four-

rou : « Comme il ne maîtrise pas parfaitement l'anglais, il a pu parfois manquer de nuance et s'exprimer trop brutalement. »  
L'usage de la langue anglaise par Jean-René Fourrou n'était pas une conquête de sa part. Depuis la fusion entre Vivendi et Seagram, en 2000, les conseils d'administration du groupe se tiennent en « anglische ». Avec d'innombrables caufouillages. Un administrateur

interrogé sur les décisions prises lors d'un récent conseil d'administration confiait, par exemple, l'air gêné : « Je ne veux pas vous induire en erreur, mais les conseils se tiennent désormais en anglais, et parfois je ne comprends pas dans le détail les décisions qui y sont prises. »  
C'est peut-être pourquoi le conseil d'administration n'a jamais rien trouvé à redire à la politique de Messier...



## La tribune

L. MONNIER-GAMMA

### Jusqu'à perdre la langue

Il est regrettable que les médias n'accordent guère d'intérêt aux travaux du Parlement européen. On relèverait des faits intéressants, comme, par exemple, la surprise des députés, lorsque, se retrouvant à Strasbourg le 2 septembre, ils découvrirent un nouvel hémicycle, dont le nombre de sièges avait été élargi en vue d'accueillir en 2003 des représentants des "futurs membres" venus de l'Est et du Sud. Cela sans attendre les référendums organisés dans lesdits pays au cours des prochains mois, ni le "référendum irlandais" d'octobre qui, s'il était une seconde fois négatif, annulerait le traité de Nice et avec lui tout le processus d'élargissement!

Certaines anecdotes mériteraient aussi d'être contées, telle celle-ci, survenue lors d'une réunion de la commission des Affaires étrangères. Pour la comprendre, il faut savoir que le règlement de ce Parlement dispose, en son article 117, que "tous les documents doivent être rédigés dans les langues officielles"; cet article renvoi explicitement à l'article 138 §5, relatif à "la contestation de la validité d'un vote". L'an dernier, il avait permis à l'auteur de ces lignes d'obtenir le report d'un vote sur un texte dont n'étaient disponibles que deux versions, anglaise et allemande.

Lorsque la même situation se reproduisit récemment, la demande, pour fondée qu'elle demeurât en droit, ne parut plus recevable: on n'allait pas surseoir à tous les votes pour un député incapable, ce pauvre retardé, de parler anglais. Et le président de demander aux députés présents rien moins que de... suspendre l'application de l'article 117! Un vote à main levée lui ayant accordé cette étrange faveur, il resta aux partisans du règlement à sortir de la salle, ce qui revenait d'ailleurs à se priver de voter.

La question se pose depuis lors: est-il raisonnable d'obliger des élus, plus nombreux qu'on ne le croit ou qu'ils n'osent l'avouer, à se prononcer sur un texte qu'ils ne comprennent qu'imparfaitement, ou pas du tout? Ou faut-il désormais recruter les députés français au Parlement européen, non point sur l'élection au suffrage universel, formule trop vieillotte peut-être, mais sur un test d'anglais? L'hypothèse n'est plus théorique...

Elle le sera encore moins bientôt: lors du sommet européen réuni en juin à Séville, les Quinze se sont séparés en demandant à la présidence danoise d'étudier la situation des langues, laquelle doit être tranchée à Copenhague en décembre. On devine comment: le recours à une langue dite "pivot" de et vers laquelle tout document sera traduit. Ce serait un pas décisif vers la langue unique que certains appellent de leurs vœux...

Certes, une décision est à prendre: avec onze langues, soit 110 "couples de langues", les frais d'interprétation et de traduction sont énormes; les "nouveaux membres" pourraient faire exploser le budget. La Commission de Bruxelles semble avoir tranché la question, demandant à nos futurs partenaires d'« utiliser uniquement la langue anglaise » dans toute correspondance - point 5 des "protocoles d'entente" du 27 février 2002... Mais le Conseil suivra-t-il cette voie?


#### Sauver la diversité linguistique

► Certes, la France aurait dû lui soumettre la question depuis longtemps, lorsque le français jouissait encore d'une bonne place en Europe; mais il est peut-être encore temps pour proposer, en accord avec tel ou tel de nos partenaires, une solution plus respectueuse de la diversité linguistique de notre continent, et qu'ont adoptée d'ailleurs la plupart des organisations internationales: le choix de deux langues de travail, comme à l'Onu, ou de trois (l'espagnol?), ou de quatre (l'allemand?).

On aimerait que le gouvernement, et les Français, veuillent bien se mobiliser sur une telle question: si décidément l'Europe en venait à parler anglais, pourrait-on continuer à prétendre qu'elle protège la diversité culturelle et politique, et représente un contrepoids à l'américanisation du monde? Gageons que, à l'heure où la même Europe met la France en demeure de ne pas appliquer sa législation linguistique, laquelle ne vise pourtant à rien d'autre qu'obliger les importateurs à traduire en français étiquettes d'emballage et notices d'emploi (ce qui est bien le moins!), la question linguistique ne va cesser de croître: elle n'intéresse pas seulement les défenseurs de la langue française et autres "souverainistes", dont le Larousse vient opportunément d'officialiser l'appellation, mais aussi les nostalgiques d'une certaine idée de l'Europe...

Paul-Marie Coûteaux

## KRUCVORTOJ





HORIZONTALE

- I) - Malsamkredar(o).  
 II) - Antikva komedivervikisto.  
 III) - Manĝegigil(o) ! / Ĉirkaŭ du semajnoj !  
 IV) - Finfine ! / Ĉirkaŭ du semajnoj ! / Prefikso.  
 V) - Hispana urb(o) / Kuirejbest(o).  
 VI) - Komenco de fortuno / Fermi.  
 VII) - Viraĉ(o) / Greka litero.  
 VIII) - Muskol(o).  
 IX) -  $C_{12}H_{20}O_{13}$ , radike.  
 X) - Ekĝem(i) post returno / Ilo aŭ mezurunuo.

VERTIKALE

- 1) - Duebleblec(o). s : sone  
 2) - Eklezia Patro / Real(o).  
 3) - Antikva ĉefurb(o) / Rabobird(o).  
 4) - Greka litero / Vangoga bukedo.  
 5) - s : Irantaro / Iea.  
 6) - Kardinal(o) / Angle kanti.  
 7) - s : Tavolo / s : Antikva monero / Mezurunuo(o).  
 8) - Kiam ? / Talofita planto.  
 9) - Modama / Armiil(o).  
 10) - Kontraŭulo de I).

BOPARO



### SUPERFLUAJ LITEROJ (nekompleta respondo)

*Broso* : robo, rosa, boro, borso, sobro, sorbo / *Bruli* : ruli, brilu, blui / *Disko* : skio, diko, kodi, kodis / *Dogmo* : modo, domo, dogo / *Kurso* : kuro, skuo, sur, suro / *Okulo* : loko, kolo, kulo, luko / *Kvadranto* : kvadrato, kvar, drato, kadavro, kravato, karto, kanto, krano / *Kastri* : strika, stria, sati, sakri / *Kerno* : kone, reno, krone / *Kovri* : kovi, vori / *Koliko* : koko, kolo, loko, liko / *Komploto* : koto, loko, komo, poto, loto, tolo / *Konto* : koto, tono, kono / *Foiro* : for, foro, rifo / *Frako* : fako, for, fora, foka / *Kora* : roka, karo / *Formo* : foro, moro / *Fonto* : foto, noto, fono / *Formala* : forma, mala, mora, mara, ora, lama, lamo / *Frazo* : fazo, faro, fora / *Fulmo* : fumo, lumo, fulo, fluo / *Forno* : for, foro, fono / *Marĉo* : ĉarmo, maro, mora, maĉo / *Masko* : sako, maso, moka / *Meblo* : belo, lobe, melo

### TRADUKA KOMPUTILO Tradukoj per komputiloj restas neperfektaj, jen kelkaj ekzemploj :

"Time flies like an arrow" (Tempo flugas kiel sago) - la rezulto estas "A time fly which likes arrows" (Tempo muŝo kiu ŝatas sagojn) . Se la komputilo devas traduki "check for wear and damage", ĝi hezitas inter "check it for wear or damage" (kontrolu ĝin pri uzdifektoj kaj eluziĝo) aŭ "check it for wear or damage it" (kontrolu ĝin por uzdifektoj aŭ difektu ĝin) . Franclingvaj frazoj kiaj "nous avions mangé" (ni estis manĝintaj) estas tiel interpretataj "ni estis manĝintaj aeroplanojn" ! Antaŭ 30 jaroj, kiam Usonanoj provis traduki la Biblian sentencon "The spirit is willing, but the flesh is weak" (la spirito ja estas fervora, sed la karno estas malforta), la komputilo elŝputis: "The liquor is all right, but the meat is tender" (La likvoro taŭgas, sed la viando estas mola) . Ŝajnas, ke interpretistoj kaj tradukistoj estos bezonataj ankoraŭ dum longa tempo . Esperantistoj sukcesas pli bone, nur kiam ili tradukas ne laŭvorte (de la patrino lingvo) sed laŭsence . Plej bone estas pensi rekte en la lingvo sed tio implicas iom da trejnado kaj praktiko .

La venonta SFS aperos komence de januaro 2003 . Sendu viajn kontribuojn antaŭ Kristnasko al  
 Jean Hénin - Beauregard - Route de Montcayroux 48500 La Canourgue  
 Telefono kaj telekopio : 04 66 32 86 36 Rete : Jean.Henin@wanadoo.fr Bonan Jarfinon !